GISTO, APR-2008.

ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

Senpage disdonata dum la Verda-Kafo-kunsido;
Punpagon sxuldas kompano kiu neglektas sian cheeston.

0404040404040404040404040404040404040404040404040404040404040404040404040404

ALMANAKO LORENZ

Laù anonco de ties redakcio mi mendis la Almanakon por 2008 plus alia libro. Gxi baldaù atingis mian adreson. Malferminte la Almanakon, mi trovis kalendaron por la pasinta jaro, 2007. Ene mi trovis teksteron de nia diligenta Affonso Soares: "Per Evangelio, mi bruligos novan lumon..." – Oni konsentas ke gxi estas frazo tute gxusta, klara, sed, mi riskas demandi, chu lumo estas bruligebla? Chi dubo pelas min al uzo de la verbo "chendi"... chendi lampon...chendi fajron sed jes, bruligi paperon...bruligi arbaron. Bonvenas reagoj, laù mia ttt-adreso.

REAL-PALMARBO

Sabaton de la monato februaro/08 mi plantis palmidon en eta publika gxardeno inter/flanke de mia domo kaj la strato. La razenon prizorgas najbaroj kaj mi plantis rozujon kiu ekfloris komence de la aùtuno sed, domagxo, baldaù pluraj flavaj rozoj estis desxiritaj de fiachaj uloj. Da tiaj multe svarmas en nia tangxerinurbo kiel, cetere en aliaj brazilaj urboj. Chi palmarbo signas mian 85-jaran ekziston. Nun mi iom dubas chu mi rajtas "planti" mejlosxtonon, por mia preterpaso je la agxo de 90 jaroj. Mia „karoserio" rapide rustigxas che pluraj vivogravaj partoj!
Junuloj, vi ne obeas min tamen mi daùras che mia ripeta ordono „ne oldigxu, miaj karaj geamikoj, se ne,vi pentos amare". Do plene gxuu la estantan vivon, sen rugxa kaj grasa viando, sen troigoj.

CHO-RO-I

China Radio Internacia, danke al miaj raportoj pri gxia signalo en Sudameriko, lastatempe tre varia, sendis al mi diskojn titolitajn China Tradicia Muziko. Ili surhavas belajn, chine-tipajn muzikojn altnivelajn. Jen kelkaj titoloj inter dekoj, angle titolitaj - Koloraj nuboj chasas la lunon – Aùtuna luno kaj trankvila lako – Dialogo inter fisxisto kaj lignisto. – Se gistoleganto interesigxas aùdi tiujn belajn muzikojn, disponu! Mi pruntedonos. Laù mi, ili estas selekto ekstreme agrabla por aùskultado en silento, hejme, kiam oni restadas tute sola, resopiroplena pri amat(in)o (kiu neniam suferis amaran elrevigxon pro amafero?) aù, por eviti pensodeviojn dum oni verkas gravajn tekstojn.

TORTURO

Eble ankaù vi, kiuj ricevas ttt-mesagxojn, legis pri ulo, kiu sin diras artisto, nomata ...Vargas Baruk. Li kurte ligis hundon en arta galerio kaj lasis gxin sen akvo kaj mangxajxoj gxis morto pro malsato kaj soifo pravigante sin per freneza aserto, ke lia ago atentigas pri la artajxoj tie eksponitaj, ke lia ago estas ankaù konsiderebla arto. La teksto petas ke oni signaturu proteston kontraù tiu fiachulo. Pro la averto ke cirkulas incitemaj tekstoj en la Retejo kaj pro tio ke mi dubas chu la fakto vere okazis kaj ke neniu vizitanto kuragxis liberigi la povran aninalon, mi ankoraù ne subskribis la kolektivan petskribon.

INFANECAJ ADOLTOJ

Nia ekologia asocio CAA-Y laùeble zorgas pri forlasitaj animaloj, tiaj formetitaj rande de eksterurbaj vojoj. Aùto haltas kaj forpelas nedeziratajn hundidojn/katidojn. Pluraj anoj de nia asocio zorgas provizore, donas kuracilon kontraù vermoj, por poste donaci ilin. Sed, ho ve! Ofte okazas ke familioj adoptas unu el tiaj idoj, por plezurigi siajn infanojn sed, miru, semajnon poste volas redoni la besteton al ni kun la preteksto, ke gxi fekas kaj urinas chie ajn! Chu ili ne havas kapon aù pensis ke eblas sxtopi la ellasejojn? – Tiaj homoj vere ne indas vivan, ludeman plezurigan animaleton. Ili nur indas mortan plusxan beston.

BONKONDUTIGA RIMEDO

Nia kara samideano Enivaldo, Brazilja, ofte sendas al mi, pere de la retejo, tre interesajn tekstojn/proponojn. Lastan semajnon li dissendis jenon, taùgan por serioze pensigi dibochemajn homojn, kiuj sin diras tute senzorgaj pri kio okazos post la morto, homoj kiuj tamen konsentas aùskulti konsilon, homoj kiuj kredas je Dio. Oni kredigu ke la chiela Kontrolejo surbendigas, dum la tuta vivodaùro de homoj, chion kio makulas ties surteran konduton. Kiam mortinto prezentigxas antaù la chefpordisto de la Chielo nome, Sankta Petro, la pekulo estas devigata spekti la filmon kiu montras chiujn liajn malbonfaritajxojn kaj abomenajxojn, surbendigitajn dum la tera vivo, kun la cheesto de Dio kaj la tuta chiela spektantaro. Kompreneble malkredantoj rolos indiferentecon sed poste, fojfoje ili memoros la filmon pri siaj vivo kun nekonfesemaj achajxoj. Tio, espereble lante iel rektigos iliajn kondutojn. – Chu vi, mia kara leganto, kredinde konsideras sin preta sxvebi al la Paradizo kaj tie ne suferi devojigon al la regno de kanajlaro?

Samideano ROBERTO.

Pasintan VK-kunsidon oni sciigxis pere de nia sindonema Elizabeth, pri la aktuala sanstato de nia tre kara Roberto kiu, post longa kuracado en hospitalo, post grava aùtoakcidento, ke li jam sukcesas diri kelkajn silabojn/vortojn. Laùdire lia lango tiome difektigxis ke nia povra samideano eble neniam plu kapablos flue paroli. Sxi aldonis ke li sendis salutvortojn al ni chiuj. Miaflanke, koran dankon. Mi kontentas pri lia resanigxo kaj aldonas: vi, karaj chefurbanoj, piochu havigi al vi tempon por viziti lin. Nur se vi iam kusxis en hospitalo vi konas solecon, kvazaù forlasitecon kaj kiom la tagoj tie estas longegaj.

Bonhumoro.

AVAREGULO (el ZH.)

Geo vespere promenveturas tra urba kvartalo. Preterpase che fama restoracio la edzino entuziasme manifestas plezuron pro la bonodoro de pretigataj mangxajxoj: mia kara, kia delica odoro! sxi diris. La edzo malrapidigas la aùton, alrigardas sian edzinon kaj proponas: se gxi vere plachas al vi, mi denove pasos antaù la mangxejo.

Jen bonegaj, el “Ridu kun poloj”.

- Karulo, nia servistino diras ke sxi gravedigxis. – Sxi mensogas. Neniu povas tion konstati post tri tagoj.

- Kiel statas la aferoj en via laborejo?
- Samkiel en la Paradizo. Chiumomente ni povas esti forpelitaj.

- Chefkelnero, kiamaniere vi preparas kokinon?
- Simple. Mi diras al gxi: venis la tempo morti.

- Sinjoro policisto, oni sxtelis mian pulshorlogxon.
- Estas la dua kaj kvarono.